

BOVETIA ESPERANTISTA JUNULARA NOVADO



REVUJE AL OKSEJT

Ĉiu estimanta sin esperantisto konsideras tre grava evento la ĝinjarajn tendarojn, SEJtojn. Tiu, kiu foje partoprenis la aranĝon, revas pri la sekvajaro, emas nepre viziti ĝin por denove praktiki la lingvon internacian, revidi malnovajn ĝeamikojn...

Oni jam ne parelas pri la populareco de SEJtoj. Sufiĉas diri, ke ili ne plu povas akcepti ĝinajn dezirantojn ilin partopreni. Pro tio aperis la ideo pri du tendaroj samvaloraj, kiuj povus anigi pli da esperantistoj. La unua provo ĝi-direkte estas farita lastsomere - samtempe okazis OkSEJT-19 en Poltava kaj OrSEJT-19 en Miass. Kompreneble, estis atendataj post ili la impresoj, rezultigo de iliaj atingoj kaj mankoj. Certe, pri la tendaroj temis dum la tuja post ili 11-a SEJM-Konferenco. Tamen la Konferencon partoprenis nur sepdeko da aktivuloj, sed ĝu per la cetera publiko ne estas interesaj la tendaraj impresoj de la partoprenintoj?

Do kien ni vidas surpaĝe de nia informilo, kiun krom kvindeko da SEJMaj kluboj legas ankoraŭ pli ol cent subtenantoj? Jam en la unua numero (p. 14 - 17) estas koncize protokolita la ĝi-tema diskuto dum la Konferenco. OrSEJTanoj ne perdas tempon, kaj en la dua numero (p. 25 - 26) aperas artikolo de V. Ebel, en kiu temas pri Paroliga periodo de OrSEJT kaj estas levitaj tre gravaj demandoj pri lingva disciplino. En la sama numero aperas la statistiko de OrSEJT (p. 23 - 24).

Nur en la 4-a numero aperas la kompilita de V. Grigorenko statistiko de OkSEJT (p. 44 - 45), tamen artikoloj ĝis nun mankas. Ĉu la partoprenintoj havas neniujn impresojn pri la tendaro? Ĉu ĝi sukcesis? Kiujn mankojn ĝi havis kaj kiujn atingojn? Kion necesus fari al la organizantoj de vicaj tendaroj?

Unue, pri la organiza periodo de la tendaro. Mi laŭ komisiio de la Komitato reviziis la preparadon dumjare. Tre grandan laboron faris V. Grigorenko, kiu ĝien prenis en siajn manojn - kaj aperigon de emblemoj, kaj kontaktojn kun superuloj, kaj dissendadon de aliĝiloj (kiuj, interalie, estis distribuataj laŭ lia propra volo, sed ne laŭ Regularo de SEJT; tial la aliĝiloj kaj invitoj trafis al homoj, kiuj ne rajtis ilin ricevi), kaj kolektadon de la mono. En la Tendara Libro oni povas legi tutan liston de la Prepara Komitato, sed pri kio okupiĝis la ceteraj homoj, kaj kie ili estis? Dum tri miaj vizitoj al Poltava kaj dum la tendaro mem mi vidis neniun el poltavanoj, krom V. Grigorenko kaj V. Hošovkin.

Kulpigi la organizintojn ni devas ankaŭ pro tio, ke ili neglektis rekomendojn de la Komitato. Komence de la preparado V. Grigorenko diris, ke estas tri lokoj por eventuala situigo de la tendaro. Malgraŭ la konsilo, la mastroj elektis la plej nekonvenan varianton - en la urbo mem.

Ankoraŭ una riproĉinda ero - mankis ordo en la tendaraj dokumentoj. La registrado estis "surpieda" - kvazaŭ la mastroj devas tuj ien ferkuri. Pro la samo, verŝajne, estas la malordo en la statistiko.

Kulpigi necesas ankaŭ la partoprenintojn kaj rekomendintojn. En la tendaro abundis "krokodiloj", kiuj ne nur ne helpis, sed eĉ malhelpis al la tendara ordo. Kaj la partoprenintoj tute ne zorgis pri la tagordo. La Tendara Estraro (ĝin eniris S.Smetanina, M.Lineckij, A.Kuprienko, V.Nočovkin kaj V.Grigorenko) ne atentis la plenumon de ĉiuj eroj de la programo, ne strebis al aktivigo de la partoprenintoj...

Do, kulpas multaj. Sed necesas noti ankaŭ pozitivajn flankojn de la tendaro.

Urme mi menciis bonan organizadon de preskaŭ ĉiuj vesperoj (vere estis simileco inter la jam kutima "KGS" kaj la novpricerbumita "Hej do, junuloj!", iom lamis la ordo dum regionaj vesperoj). Kiel ĉiam, ĝustaloke estis la ĉiamaj aktivuloj - M.Bronŝtejn, V.Samodaj, G.Gercikov, S.Gaidamaviĉius. Gojigas la aktivado de la novaj - A.Kazakov, A.Kuprienko, A.Koroleviĉ, O.Kopystjanskaja, M.Lineckij. Necesas ankaŭ laŭdi la subtenantojn A.Laur, N.Kirilova, B.Tokarev, S.Kuznecov, T.Aŭderskaja, J.Dagys.

Do, kian konkludon oni povas fari? Ĉu estis OkSEJT sukcesa aŭ male? Bone esprimis sian opinion A.Kotelnikov: "La tendaro ne fiaskis, sed simple trapasis, sen iaj postsignoj".

Kaj laste, pri la posttendaraj devoj de la mastroj. Denove la poltavanoj ne plenumas la Regularon de SEJT: ĝis mezo de novembro devis esti preta la adreso, sed la mastroj preparis ĝin kun monata prokrasto; ĝis mezo de decembro devis esti preta la financa raporto - venis jam la nova jaro, sed la v/p pri financoj ankoraŭ atendas ĝin (necesas menci, ke la OrSEJT-mastroj jam delonge raportis kaj eĉ sukcesis respondi al precizigaj demandoj).

Oni povas kulpigi la komitatanojn, ke tiuj ne instrukois la mastrojn. Tamen B.Anoŝin kaj M.Bronŝtejn, kiujn neniu instrukois, faris la financajn raportojn, indikinte ĉiun kopekon.

Ni devas ankoraŭ multe diskuti pri la tendaroj, ĉar ankaŭ el la artikoloj la kluboj-mastroj ĉerpas la ideojn, evitas mankojn ktp. Kaj mi petas partoprenintojn kaj partoprenontojn: sendu viajn opiniojn, proponojn, ideojn.

D.Cibulevskij, vicprezidanto de SEJM.

MALFERMITA LETERO AL L.NOVIKOVA

Mi eldiros miajn opiniojn, kaj vi jam juĝu, ĉu estas en ili io trafa por organizo de E-tendaroj aŭ ne.

1. Mi ne scias, kiel oni nomu en Esperanto tiun homon, kiu ne ellernis eĉ elementan E-lernolibron, sed mi estas firme konvinkita, ke tia homo ne estas eĉ komencanto.

Tiaj homoj en OrSEJT-19 abundis, kaj verŝajne necesas rifuzi akcepton de tiaj "esperantistoj" en la tendaron, t.e. instrukcii al la kluboj, ke ili ĝenerale ne alsendu tiajn "hipopotamojn". Pro ĝia ĉeesto la lingva nivelo estas katastrofe malalta, kaj vi ĝin neniam kaj neniel levos. En tia tendaro estas nenio por lerni ne nur al spertulo aŭ progresanto, sed eĉ al komencanto.

2. Komencanto estas tiu, kiu konsciencie ellernis elementan lernolibron (Kolker, Saĥarov, Sergejev, Szerdahelyi-I k.s.), do havas preskaŭ 2500 radikvortojn en la kapo, sed dume ne scipovas tre bone uzi ilin. Li legas, tradukas sufiĉe bone, tralegis kaj radukis almenaŭ 300 - 500 pagojn en Esperanto. Tamen li misas la radikojn, kreas novajn vortojn, ne estante certa ke kreas korekte. Li dume ne parolas, sed volas paroli. Mi opinias, ke tia homo estas vera komencanto. Al ĉi tiu komencanto necesas partopreni en la tendaro, REVU

ktp., ĉar en la tendaro li povas forigi siajn erarojn, dubojn pri uzo de la gramatikaj reguloj. la tendaro instruos lin krei kaj uzi novajn vortojn. Li kredas, ke li povas paroli kaj ekparoles tuj post la tendaro.

Sed lin necesas instrui! Ja en multaj kluboj la kursojn gvidas duonlernintoj-komencantoj. En la kursoj ili "skulptadas" lernantojn similajn al si mem. Kaj se ne korekti ĉiujn erarojn de la komencanto, ĉi tiuj eraroj ripetigos ĉe la kursfinintoj. Kaj la ĉefa estas jeno: de nula ŝtupo la kursfininto leviĝas ĝis ŝtupo de komencanto dum unu jaro, sed de ĉi tiu ŝtupo ĝis tiu de progresanto li, sen lernado en la tendaro, leviĝos dum 2 - 4 jaroj (ja ne ĉiu komencanto estas genio). Kaj plejparte la komencantojn ne havas la vortarojn, perfektigajn lernolibrojn, beletran literaturon.

En nia klubo (kaj en aliaj) ne estas spertulo, kiu povus korekti niajn erarojn, kaj ni ankoraŭ longe "kuirigos en propra suko". Do la vojo de plus lernado estas bremsata. Jen pro kio por mi (kaj por aliaj) estas tre necesa serioza instruado en la tendaro.

3. Do, antaŭ la alveno de la tendaranoj necesas laŭ la aligiloj distribui ilin en tri partojn laŭ jaroj de E-studado: 1-a, 2-a, 3-a kaj pli. Dum la unua tago de la tendaro en ĉiu parto necesas analizi la lingvan nivelon kaj laŭ ĉi tiu nivelo kompili la grupojn por lernado.

La duan tagon necesas ekzameni ĉiun grupanon: 1) doni por traduko beletran tekston; ekscii vortprovizon kaj kapablon de la lernanto; 2) doni por traduko el la rusa al Esperanto kun vortaro; klarigi la scion pri: a) kunmetado de vortoj, b) uzo de prepozicioj, sufiksoj ktp., c) uzo de kazoj, ĝ) scipovo skribi datojn, ktp. Nur post tio vi ekvidos, pri kio kaj kiel (kun aŭ sen lernolibro) necesas lernigi.

Sed nepre! Instrui serioze - ne tiel, kiel tion faris kelkaj "instruistoj": sen preciza programo kaj sen rezulto. Principo: "parolu pri tio, parolu pri ĉi tio" ne taugas por serioza instruado.

Mi proponas kiel bazon de lernado akcepti la lernolibron de Sergejev kaj fari 5 lecionojn. Anticipe prepari ekzercojn, legaĵojn ktp. Kaj speciale atentigi al specifajoj de Esperanto pri apartaj frazoj, kiuj ne koincidas kun la rusa lingvo.

Nur tiam vera komencanto ne opinios, ke la tempo, pasigita en la tendaro, estas perdita, kaj ne seniluziĝos pri la tendaro mem.

Sed mi vidas, ke kelkaj niaj klubanoj kaj mi mem ne tre progresis en Esperanto post la tendara instruado. Kaj mi estas firme konvinkita, ke sen la serioza lernado Esperanto-movado lamos eterne kaj la lingvo neniam alportos veran utilon.

Nun vi povas kompreni, kial mi kontraŭas la piedmarŝadon. Dum serioza lernado pri la marŝado ne povas eĉ temi. Kaj ĝenerale - laŭ mia opinio, la piedmarŝadon elpensis tiuj mastroj-organizantoj, kiuj ne povas plenigi la vesperojn per interesaj aranĝoj. Kaj ju pli malspitemaj estas la organizantoj, des pli longaj estas la piedmarŝadoj.

Mi proponas enigi en la aligilon - almenaŭ unu fojon, por la 20-aj SEJToj - la demandon: Kiu estas ĉefa celo, pro kiu vi partoprenas la tendaron: ĉu E-lernado, aŭ piedmarŝado, aŭ simpla ripozo? Mi pensas, ke eĉ unufoja enketado donos al vi ion por primedito.

Kaj ankoraŭ: mi alveturis en la tendaron ne por turismo, sed por la lernado de la lingvo Esperanto. Se mi bezonus la turismon, mi aliĝus al ruslingva turista grupo kaj forirus en la montaron. Sed kio koncernas la amikiĝon, kiun donas al mi Esperanto, tio estas aparta temo. Ja mi parolas pri la komencanto!

4. Nun pri la progresantoj. Ĉi tiuj homoj eble legas, parolas, tradukas sufiĉe bone, ne miksas la sufiksojn, prepoziciojn ktp.; sed mi estas certa, ke ili ankoraŭ ne tre bone faras la kunmetitajn

vortojn, tradukas poeziaĵojn, ili havas problemojn pri la kursgvidado ktp. Do, ankaŭ por ili estas bezonata lernado en la tendaro.

Krome, ili ja povus aktive helpi pri instruado de komencantoj. Sed per kio ili helpis al la komencantoj en OrSEJT-19, por ke tiuj plialtigis sian lingvan nivelon? Per nenio! Male: li - progresanto, kvazaŭ pro estimo al la nacia lingvo de la komencanto, degnis krokodili. Ĉu la progresanto ne povas per duonhora kolekti ĉirkaŭ si 5 - 7 komencantojn kaj paroli kun ili pri io? Povas! Kial tio ne okazis? Ĉu ili ne estas konataj? Se tiel, por kio do la Paroliga periodo? Kio do estas ĝiaj fruktoj? Kiel estis kelkaj progresantoj malproksimaj de la komencantoj antaŭ PP, tiel ili restis je la sama distanco post PP. Do, ĉu la valoro de PP estas nur en tio, ke dum la piedmarŝado oni povas demandi kiel nomigas iu muŝeto aŭ herbeto?

Mi opinias - ne! Kaj ankaŭ vi, proponante instruadon en naturaj kondiĉoj, havas absolute aliajn celojn. Mi opinias, ke en via kompreno de la naturo gravas tio, ke la esperantistoj parolas pri tiu aŭ alia temo suflorata de ĉirkaŭa naturo mem: valo, montgrimpado, preparado de fajro, manĝado ktp. Sed ĉi tiuj temoj, scenoj estas tre rapide pasantaj, kaj estas dube, ke la esperantistoj memorfiksos la aŭditajn vortojn. Vivante en la tendaro kaj aŭdante la vortojn de ĉiutaga vivo, la komencantoj pli rapide memorfiksos la frazojn. Tia vivo inter la vortoj donos pli multe da utilo.

5. La spertulo aranĝas ĉiujn lecionojn por la komencantoj kaj gvidas la laboron de siaj helpantoj-progresantoj. Se la tutan instruadon pripensi centralize, oni povas prepari proksimumajn rekomendojn de la lecionoj por ĉiuj demandoj. Pluse al la scipovo kaj inventemo de la spertulo mem, tio igos esperi, ke la instruado estas bona.

La komencantoj devas okupiĝi ne pli ol 1,5 horojn tage, ekz. de 10.00 ĝis 11.30. La laboro de la E-Universitato devas esti ne paralela al la kurso por la komencantoj, sed post ĝi, ekz. de 12.00 ĝis 13.30, por ke la prelegojn aŭskultu ĉiuj: umuj ekkonas la enhavon, la aliaj perceptas la lingvon per la oreloj.

La spertuloj okupigas pri la tradukado, metodikaj demandoj, el-laboras rekomendojn por la kluba agado kaj instruas pri la laboro en E-kursoj. Ni devas tre klare imagi, kion kaj kiel fari en la klubo. Ja la Konferenco nur ellaboras la ĉefajn celojn kaj taskojn de la kluba laboro, sed la tendaro devas instrui, kiel ilin plenumadi. Kaj la cetero estas la fantazio de la klubanoj.

6. Ĉar ĉiu grupo konsistas el spertuloj, progresantoj kaj komencantoj, ili devas dum ĉiuj ripozaj vesperoj esti kune: ĉi tio estas daŭrigo de la instruado en la naturaj kondiĉoj. Necesas en la tendaro organizi konkuradon, kun premioj, pri plej bona preparo kaj partoprenigo de komencantoj en la laboro kaj vivo de la tendaro.

Do, kiel vi vidas, dum la tutaj dek tagoj de la vivo en la tendaro por ĉiuj estas laboro eĉ sen PP. Tial mi ne vidas neceson de senutila elspezo de tri - kvin tagoj por PP. Des pli, ke kelkaj gvidantoj ruzas kaj sidas ĉiujn tagojn ne tro fore de la tendaro kaj preparigas al la interkona vespero. Estas pli bone sidi en la tendaro oficiale kaj doni pli da utilo. Kelkaj spertuloj kaj progresantoj fordonis pli multe da tempo por la fiamindumo kaj diboĉo ol por la E-laboro. Necesas firmi la vojon en la tendaron al tiaj fiesperantistoj, ĉar pro ilia konduto Esperanto perdas la aŭtoritaton kaj allogecon. Mi jam vizitis kelkajn renkontiĝojn kaj vidas, ke ĉiam la samaj fiesperantistoj kondutas maldece.

7. Krome - kelkaj vortoj pri REVU. Ĉu iu anticipas kontrolas ĉian programon? Ĉu ekzistas komisiono por kontroli pretecon de la renkontiĝoj? Mi ekzemple ne volas elĵeti tempon por fuŝaĵo, kiu estas dum REVU-16 (Ĉeljabinsk, 6.-8.11.77. - La red.). Sekvafoje mi nevole pensos: ĉu indas veturi al regiona renkontiĝo aŭ ne?

Mi esperas, ke la reĝoj helpos al vi. v.Vjazovcev (Salavat).

"LIRO-77"

La 17-an - 18-an de decembro apud Miass, en pitoreska ripozbazo "Rassvet", okazis la tradicia Zamenhofa festo, organizita de Miassa E-klubo "Malafita stelo". En kadroj de tiu ĉi festo, dediĉita ĉi-jare al la 90-jara jubileo de Esperanto, sukcese pasis la Belarta Konkurso (ankau jam tradicia) "Liro-77".

La aranĝo kaj similis la pasintjaran, kaj diferencis de ĝi. Similis la medio de la renkontiĝo: komforta bazo en pina arbaro ĉe la belega lago Ĉebarkulj, freŝa vintra aero, varma amika etoso. Similis la programo: solena malfermo kun nepre prelege pri Zamenhof kaj lia heredaĵo, festa vespero kun bankedo, koncerto, dancoj ktp., kaj la konkurso.

Sed estis ankaŭ multo nova, ne ripetanta la pasintan jaron. Unue, plimultiĝis la partoprenintoj de la konkurso. Tre aktive partoprenis ĉeeste Ufa E-klubo: nin vizitis tiaj spertaĵ geesperantistoj, kiel Kolker B., Cvileneva N., Fomenko G., Silantjeva A. k.e. Entute la konkurso ĉeestis 53 personoj el 5 urboj (Ĉeljabinsk, Magnitogorsk, Miass, Tjumenj, Ufa). La kvanto de kluboj-partoprenantoj pligrandiĝis plejparte dank' al foresta partopreno (tiamaniere sin prezentis aŭtoroj el 11 urboj: Barnaul, Doneck, Kievo, Krasnoarmejsk, Omsk, Salavat, Satka, Sizranj, Taŝkent, Tiŝvin, Tjumenj).

Due, la jurio ĉi-jare estis plene ĉeesta (pasintjare kelkaj jurianoj devis juĝi foreste), kompetenta kaj reprezenta. Trie, la programo de la renkontiĝo generale kaj de "Liro" aparte enhavis ankaŭ novajn elementojn. Unuafoje la partoprenintoj de "Liro" havis plezuron spekti koloran filmon (pri OrSEJT-19) kaj altkvalitan fotoekspozicion, faritajn de la estro de Fotoserve de SEJM Grebenjuk V. (Miass). Kio koncernas "Liron", nin ĝojigis tiu fakto, ke la programo de la konkurso estis plenumita komplete: estis prezentitaj ĉiuj branĉoj. Se pasintjare ni ne havis eĉ unu originalan versaĵon, ĉi-foje en la branĉo de originala poezio sin prezentis 7 aŭtoroj. Riĉa kaj altnivela estis la branĉo de originala melodio por libere elektita E-teksto (6 melodioj). Pli kaj pli admirigas nin Aroloviĉ N. per siaj belaj kaj sentoplenaj melodioj (ĉi kultivas klasikajn, precipe romancajn, formojn de muzikverkoj). Iom konsternis la jurion la kvanto de tradukitaj E-tekstoj (19!). Forta kaj varia estis la branĉo de kantoplenumado. El malnovaj kantistoj mi volus menciigi belajn plenumojn de Moŝkina V. (Miass), Ilkajev V. (Ĉeljabinsk), Silantjeva A. (Ufa). Sed precipe agrable impresis nin altkvalita plenumo de kantoj fare de novicoj: Gavrilov V., Katajeva L., Sedova N., Sokolova L. (Miass).

Antaŭ ol anonci la rezultojn de la konkurso, mi volus prilumi jenan demandon: aŭdiĝis voĉoj pri superflueco de kelkaj samspecaj konkursoj en kadroj de SEJM ("Muzo", "Liro", "Oriento"). Ni volus scii opinion de SEJM-anoj pri tio. Mia opinio estas, ke necesas ankoraŭ pligrandigi kvanton de similaj konkursoj. Lige al tio mi volas rememorigi mian pasintjaran proponon ("A"-7(40), p.74) pri reto de regionaj kaj tutlandaj konkursoj. Ĉiu regiono de SEJM-aktiveco aranĝu dum jaro propran konkurson (Ĉebaltia kaj Velgo-Urala jam havas) kaj somere en SEJToj okazu tutsovetaĵ konkursoj ("Oriento-77" en kadroj de OrSEJT-19 estis unua provo ĉi-rilate).

La regionaj konkursoj versaĵe povas esti migrantaj (ne nepre ligitaj al la sama loko). Oni povas okazigi ilin, ekzemple, en kadroj de regionaj renkontiĝoj. Tio, unue, pliamasigus la konkursojn; due, helpus fari programon de la renkontiĝoj pli riĉa kaj varia; trie, evitigus supersarĝon de apartaj kluboj, por kiuj estas malfacila tasko ĉiujare organizi tian seriozan aranĝon.

Do, belartatantoj, reeĥu al la propeno!

L. Novikova, v/p pri renkontiĝoj.

Rezultoj de la Belarta Konkurso
"Liro-77"

I. Originala poezio:

- 1-a premio - Caldajev V. (Barnaul) por "Pri mondoj iuj malproksimaj..." kaj "Konstruus mi por vi kastelon...";
2-a - Bronŝtejn M. (Tihvin) por "Estas ja feliĉo...";
3-aj - Kuznecov J. (Omsk) por "Al verdaj knabinoj" kaj Berezin Gr. (Krasnoarmejsk, Donecka reg.) por "Novjara spiro".

II. Originalaj kantotekstoj:

- 1-a premio - Bronŝtejn M. por "Kun pluvoj paŝas en la strat'..." (muziko de Bee Gees);
2-a - Cvileneva N. (Ufa) por "Folio de acero" (muziko de la aŭtorino);
3-a - Kuznecov J. por "Kanto de omskaj esperantistoj" (muziko de M. Snegirjov).

III. Originalaj melodioj por libere elektita E-tekste:

- 1-a premio - Aroloviĉ N. (Sizranj) por "Se vi pri amo pensis" (E-tekste de J. Korinek);
2-a - Katajeva L. (Miass) por "Novjara balo" (rusa teksto de la aŭtorino, traduko de L. Novikova);
3-a - Cvileneva N. por "Konstanta koro" (E-tekste de R. Rosseti).

IV. Tradukita poezio:

- 1-a premio - Novikova L. (Miass) por "Glacio-69" kaj "Ne forgesu" de A. Voznesenskij;
2-a - Andrianova N. (Kievo) por serio de versaĵoj;
3-a - Berezin Gr. por "20 tagojn iris karaveloj" de I. Jefremov.

V. Tradukitaj kantotekstoj:

- 1-a premio - Novikova L. por serio de kantoj kun substreko de "Mia amatin'" (teksto kaj muziko de J. Vizbor);
2-a premio - Dobridina V. (Miass) por serio de kantoj kun substreko de "Adiaŭa valso" (teksto de A. Didurov, muziko de A. Fljarkovskij);
3-a - Cvileneva N. por "Mi malfermis la pardon".

VI. Plenumo de versaĵoj:

- 1-a premio - Bezukladnikova I. (Miass) por "Koro de patrino" (ukraina popola fabelo);
2-a - Kalik D. (Miass) por "Mi ne gripas" de L. Jevsejeva;
3-a - Kalik N. (Miass) por "Gardu la amikojn" de R. Gamzatov.

VII. Plenumo de kantoj:

- 1-a premio - Moŝkina V. (Miass) por "Kabanet'" (traduko de V. Dobridina);
2-aj - Moŝkina V. kaj Ilkajev V. (Ĉeljabinsk) por "Folioj flavaj" (muziko de R. Pauls, E-teksto de R. Kutlubajeva), Katajeva L. kaj Novikova L. por "Novjara balo";
3-a - Moŝkina V. por "Lumo-river'" (muziko de L. Novikova, E-teksto de J. Estok).

Jurio: Kolker B. (Ufa), Cvileneva N. (Ufa), Mametova D. (Tju-menj), Pavlenko S. (Magnitogorsk), Ilkajev V. (Ĉeljabinsk), Dobridina V. (Miass), Novikova L. (Miass).

SUFIĈAS PROPONOJ - NI AGU!

Mi volas arde subteni la opinion de V. Sapoĵnikov en "A"-4(48). Certe, ni ne propagandas kaj ne reklamas E-on. Pli vere, ni faras tion tro hazarde, plejparte individue, sed ne organizite. Kiu legadas la popularan ĵurnalon "Literaturnaja Gazeta", tiu ne povis ne rimarki la diversspecajn diskutojn, kiuj iam finiĝas je nulo, tamen

plejparte oficialaj instancoj, al kiuj turnas sin la legantaro kaj la redakcio, finfine respondas. Ni imagu, ke la redakcio de "LG" ricevis leterojn de SEJM-anoj (almenaŭ po unu de ĉiu klubo) aŭ de individuaj subtenantoj. Kiel skribas en la sama numero de "A" A. Medinsk, "... redakcio respondas, se venis almenaŭ 2 - 3 leteroj". Nature, pli facile estas respondi al tiu multenombre leteraro pere de la ĵurnalo. Des pli, en la unua ĉi-jara numero de "LG" la fako de ekonomio komencis novan rubrikon "Zond" por sondi la socian opinionon pri ĉio nova, progressa. Kiel oni klarigas, "Zond" estas areno por malfermitaj diskutaj konkursoj inter adeptoj de iu sociutila iniciato kaj iliaj kontraŭuloj.

Por partopreno en la diskuto de "Zond", oni devas sendi deklaron laŭ jenaj kriterioj. 1) Proponigas io nova, ne kutima en socia sfero de la vivo, sed havanta vastan socian intereson. 2) La iniciatoj jam havas realan sperton de efektivigo, ilia ideo jam eksperimentigas en iuj ajn konkretaj organizaĵoj. 3) La ideo havas plej diskutitan karakteron: necesas montri la subtenantojn kaj kontraŭulojn.

Se tian deklaron subskribos la reprezentantoj de niaj E-klubo, al mi ŝajnas, ke la redakcio povas pozitive reŝi al nia iniciato. Gravas, ke la deklaro estu verkita sufiĉe argumentite. Ni nenion perdas, sed por propagandi povas gajni multon. Oni diras, ke por reklamo taŭgas kaj laŭdo kaj insultado, nur ne silento.

Plue. La plej interesajn E-materialojn necesas dissendadi al klubaj respondeculoj, por ke ili devige sendu ilin al lokaj redakcioj kaj nepre sciigu pri tio al Populariga fako. Praktike, mi opinias, ke "A" devas havi specialan propagandan rubrikon, kie oni enmetas tiajn informojn por dissendo al periodaĵoj. Tiamaniere ni ŝparos tempon kaj centralizos la laboron.

Fine, revenante al la titolo de mia artikolo, mi korektas min: Ni agu, sed ankaŭ proponu.

M. Ziskandoviĉ (Novosibirsk).

ĈU SKRIBI, ĈU NE SKRIBI?

La 26-an de marto 1978 ni festos strangan jubileon. Samtage antaŭ unu jaro "Komsomolskaja pravda" sciigis, ke oni invitos scienlistojn por respondi al la demandoj, kiuj interesas la scivolemajn legantojn. Inter tiuj demandoj sur la dua loko estis menciita Esperanto. Do, devis baldaŭ aperi artikolo pri tiu grava temo... Ne pensu, ke vi preterlasis la publikacion - ĝi ne ekzistas. Tamen ne kulpigu la ĵurnalon kaj la scienciston: plejparte kulpas vi mem. Bone diras la proverbo: ne gutas mielo el la ĉielo. Sed vi staris kun malfermita buŝo, elita supren, anstataŭ preni poŝtkarton kaj rememorigi al la redakcio.

Antaŭ vi kuŝas pura paperfolio, vi hezitas: ĉu skribi, ĉu ne skribi. Kaj mi, pensante pri bono al Esperanto, ne scias kion konsili al vi. Do, por ekzemplo - kion faris bona letero. Unu eksterlanda samideano turnis sin al Moskva radio kun propono disaŭdigi en Esperanto. La unua respondo estis: ni parolas en mondvastaj lingvoj - angle kaj france, sed vi proponas iun Esperanton... Tamen la samideano estis persista: jes, sed pro kio vi preferas la lingvojn de koloniistoj al la lingvo de paco kaj amikeco? Tio efikis kaj fine rezultigis tri elsendojn de Moskva radio, kiujn vi eble eĉ aŭdis.

Sed jen alia ekzemplo. Nia samlandano el unu suda urbo, leginte intervjuon kun prof. Isajev en la revuo "Soveta Unio" kaj spertinte malfacilaĵojn pri E-agado en sia urbo, turnis sin kun plenda letero al la revuo: la stato de E-movado estas tute alia kompare kun la enhavo de la intervjuo. Kaj ankaŭ tio efikis: ŝtopis la fonton, kaj

ni ne plu povas paroli pri Esperanto surpage de tiu revuo... Komentoj ne necesas. Kiel peti similajn homojn ne fari ilian kontraŭesperantan laboron, ŝpari la tempon kaj la forton? Tamen, kiel avertas rusa proverbo: Ĉies buŝeton oni ne ŝtopos per tuketo. Jes, karaj samideanoj, unu misa letero estas tiu sama guto da gudro, kiu difektas barelon kun mielo. Mi rememoras, kiel unu ĉefredaktoro, konata soveta verkisto, rimarkis en sia revuo: "Mi ne imagas "Revizoron" de Gogol soni en Esperanto". Iu esperantisto, tre fiera pri sia scio, skribis, ke ĝuste tiu teatraĵo estis scenigita dum unu Universala Kongreso de Esperanto. La ĉefredaktoro pardonpetis surpage de la revuo kaj ... fermis la revuon por Esperanto. Do, Pirra venko!

Eble ne skribi? Tamen en la nur komenciĝinta jaro jam aperis du artikoloj - por kaj kontraŭ Esperanto. La unua en "Nauka i ĵiznj", N-1 - referato de Peevski. Kial ne doni al la redakcio novajn sciigojn pri la sama temo kaj peti ĝin aperigi artikolon, similan al tiu de D.L.Armand - "Esperanto kontraŭ lingva haoso en la scienco"? Sed kion fari kun la malmoderne misprezenta publikaĵo en "Znanije - sila", N-2, p. 47 - 48? Estos bone se reeños kompetentulo pri maŝinaj lingvoj, ĉeftemo de la artikolo (same fuŝita de la aŭtoro, laŭ aserto de unu fakulo pri maŝinlingvoj). Do, kial ne skribi?

Ankoraŭ vin atendas Moskva radio, kies E-disaŭdigojn pluajn vi devas instigi pere de la eksterlandaj amikoj.

Ankoraŭ vin atendas Olimpika organiza komitato (Moskvo, ul. Gorkogo 22-b).

Ni memoru, ke oni nin agnoskas ankaŭ pro nia batalemo por Esperanto. Tamen vorto skribita povas forte malutili: ekzemple, letero de unu nia samideano (jam mortinta) estas armilo en la manoj de niaj kontraŭuloj...

Do, eble silenti? Silento estas oro, ĉu? Tamen saĝe diris Oskar Wilde: "Se oni pri io ne parolas, ĝi fakte ne ekzistas". Ĉu li aludis pri nia E-movado?

A.Ĥarkovskij (Moskvo).

KVIETO NE POR NI!

Por nuna agadjaro Krasnojarska E-klubo planis sufiĉe multe. Ankaŭ strukturan reorganizon de la klubo. Parte ni plenumis la aferon - surpapere. Tamen la sistemo de klubaj filioj ne estis plene disvolvita pro manko de E-lernolibroj (taŭgaj!). Reale ni ne tre sukcesis salti antaŭen (kompare kun pasinta agadjaro). Tamen ni komisiis al niaj spertaj geaktivuloj la plej gravajn kaj jam tradiciajn objektojn: funkcias E-fako ĉe la fakultato de sociaj profesioj de la Universitato (gvidas Sudareva E.A., Taskina I.I.), la kurson komencis ĉ. 30 gestudentoj; aktive daŭrigis sian laboron E-sekcio de KIA ĉe la teknologia instituto (I.Danilin, V.Elpaŝev, E.Potapova), ĉ. 20 komencantoj; neaktive disvolvas sian laboron E-sekcio de KIA ĉe la Universitato, ĉar la gvidanto V.Fadejev ankoraŭ estas ne tre sperta.

Urbaj E-kursoj ĉe urba Kulturpalaco ĉi-jare estis organizitaj bone: la estraro de la palaco aperigis 4 specialajn anoncojn en regionaj gazetoj kaj aranĝis grandan multkoloran standon ĉe la palaco mem. Venis pli ol 100 dezirantoj. Estis formitaj 4 grupoj po 15 aŭskultantoj. Gvidantino de la kursoj - M.Miĉurina, krome instruas I. Stepanova, G.Peŝkova, E.Bloĥina. Uzante la lernolibron de V.Silas kaj la vortaron de Sergejev, ili sukcesis kolektivigi la gekursanojn, interesigi ilin ne nur pri Esperanto, sed ankaŭ pri la movado. Multaj el la kursanoj jam sufiĉe aktive propagandas Esperanton en siaj labor- kaj studlokoj. Interalie, tio estas tre interesa formo

de aktivigo: ne atendi ĝis kiam kursano ellernos Esperanton, sed saĝe instigi lin al E-laboro. Ĝa kiel ni ofte faras? Instruas al ili la lingvon, donas al ili E-informadon, sed ne prenas de ili aktivecon! Nun ni en la klubo faras tiel: vizitas la kursojn, konversacias kun ĝiu interesanta nin homo aparte, proponas al li konkretajn taskojn (aperigi artikolon, prelegi pri Esperanto) kaj kontrolas plenumon. Multaj el ili mem proponas sin, kun aliaj oni devas pli longe interparoli, kuraĝigi ilin.

Tiamaniere ni kreis ĉe la propaganda faka sistemon de E-propagandistoj, uzante certe ankaŭ la klubanojn. Taskoj de la propagandistoj ne estas komplikaj: konstante aperigi E-materialojn en gazeto de sia stud(labor)loko, prelegi tie. Pri komenca etapo de la gazetara laboro oni povas diri pli konkrete: serio de artikoloj pri 1) Esperanto, 2) la klubo, 3) someraj E-aranĝoj, 4) korespondaj E-kursoj, 5) E. kaj scienco, 6) E. kaj paco ... Kaj estonte - zorge pri la konstanta rubriko en la gazeto. En perspektivo la propagandiste plispertigos kaj povos estigi bona gvidanto de la rondeto, sekcio, klubo en la sama oficejo.

Ekde februaro komencas sian laboron nova E-klubo de komencantoj en Kulturpalaco de la kombajna uzino. En la nova palaco la estraro donas al ni konstantan ejon. Parto de la urbaj E-klubanoj okupiĝos pri organizo de la nova filio. La aŭditorio estas laboristoj kaj oficiistoj de la uzino. Nova kaj larĝa kampo por E-agado!

Nia klubo bone ekkontaktis kun kelkaj plej fortaj kluboj de internacia amikeco de la urbo. La 26-an de decembro 1977 en la urba Kulturpalaco okazis konsultigo de prezidantoj de lokaj KIA. Venis reprezentantoj el KIA de la pedagogia, medicina, teknologia institutoj, memkompreneble ĝeestis la iniciatintoj - estraranoj de la urba E-klubo. Post longa konversacio ili decidis fondi la koordinan centron (la E-klubo) de la freŝkreita Konsilantaro de la urbaj interkluboj. Estas decidite ankaŭ organizi serion de sabatlaboroj por la Fonduso de Habana festivalo de junularo kaj majfestadon en la tradicia revolucia loko "Krasnojarskije stolbi". La koordinata centro devos kolekti, multoblige kaj dissendi la planojn de laboro; kompili la adresaron de aktivularo; organizi kunsidojn de la Konsilantaro.

Niaj kontaktoj kun la gorkomo de VLKSM daŭras. Oni subtenas kaj favoras nin, helpas al ni pri problemoj, ligitaj kun partopreno en la E-kongresoj en Bulgario, en la tutsoveta konferenco pri evoluo de amatoraj junularaj unuigoj (Novosibirsk, 1978, organizas OK de VLKSM). Certe ili subtenas nin pri kunlaboro kun la interkluboj kaj fakte donas realan apogon por niaj komunaj aranĝoj. Kion ni povas konkludi? Se la E-klubo laboras, estas sufiĉe iniciatema - do la komsomolaj instancoj ĉiam helpas. Oni devas nur saĝe montri sian neceson, potencialajn kapablojn. Tamen, kiu ne ŝatas raportoj kaj planoj - tiu verŝajne ne plaĉos al la oficialuloj. Memoru tion ĉi, geamikoj!

Plifavoriĝis rilato de regiona gazetaro al ni. Fakte tio dependas de nia agado: ni pliaktivigis en pli vasta (urba, regiona) nivelo, havas kion diri - do, oni volonte publikigas niajn materialojn. Lastatempe la ĵurnalo "Krasnojarskij komsomolec" aperigis artikolojn de A.Urdajev (10.9.77.), I.Steĉpanova (26.11.77.), V.Sapoĵnikov (5.1.78.); "Krasnojarskij rabeĉij" - tiujn de N.Semjonov (15.9.77.), V.Sapoĵnikov (17.12.77.). Plimultigis oficejaj, uzinaj kaj institutaj gazetoj, kiuj publikigas E-materialojn.

Ni daŭrigas la klopodojn en sfero de dokumentado: planis la klubkunvenojn, faris programon de ĝeneralaj amasaj aranĝoj far la klubanaro, ellaboris perspektivan laborplanon por la agadjaro, kompilis planon de kunsidoj de la klubanoj. Ni konstante raportas pri nia agado al niaj patronaj oficialaj instancoj. Komprenante la

dangeron de "papera maro", ni tamen opinias, ke planado kaj dokumentado de la kluba laboro estas ege bezonata por ĉiu E-klubo, kiu volas marŝi antaŭen kaj ion atingi. Ne ĉiuj planeroj estas plenumataj, sed la plano helpas en kunordigo de la agado. Oni certe rajtas fari pli multe ol diktas la planoj, ŝanĝi ilin laŭcirkonstanco, sed ne havi ilin - signifas ne evolui.

Komence de la agadjaro ŝanĝiĝis konsisto de la kluba estraro. Jen nunaj gvidantoj de Krasnojarska urba E-klubo: prezidanto - V. Sapoŝnikov, SEJM-representanto - S. Bronov, sekretariino - E. Potapeva, v/p pri financaj aferoj - A. Urdajev, v/p pri E-propagando - I. Danilin, v/p pri korespondo - V. Elpaŝev, v/p pri instruado - M. Miĉurina, v/p pri kultur-amasa agado - E. Bloŝina, v/p pri historia agado - V. Nagičev, v/p pri teknikaj aferoj - G. Ĉeŝev.

Fakte ĉiu vicprezidanto estas estro de certa fako, en kiu laboras la geklubanoj. Kiom kaj kiel ili tie laboras - certe dependas de energieco de la vicprezidanto. Kiel ni komencis kaj kiel la klubo finos la agadjaron, ankaŭ dependas plejparte de la estraro. Do laboru ili aktive por daŭrigi estadon de la klubo en la unuaj vicoj de SEJM!

V. Sapoŝnikov, prezidanto de Krasnojarska EK.

PRI TALLINNA ESPERANTO-KLUBO

Organizita E-movado en Estonio komenciĝis antaŭ 70 jaroj: en 1907 estis organizita "Revela Esperantista Grupo". Ĝian agadon partoprenis dudeko da tiutempaj aktivuloj. Oni organizis kursojn, strebis propagandi la internacian lingvon, praktikis ĝian uzadon por internacia komunikado. En 1908 la grupo eldonis eĉ gazeton. En 1913 la agado de REG estis ĉesigita pro politikaj kaŭzoj far la kara polico.

En 1919 ekfunkciis en Tallinn (antaŭa Revel) la societo "Espero". Ties agado estis diversflanka kaj sukcesplena dank' al multaj aktivuloj, kiel Helmi Dresen, V. Vaŝer, J. Rosenberg, E. Linnuse (Lübek), H. Saha (Sakaria), J. Törn k.a. Edukiĝis multaj internacie konataj E-instruistoj (H. kaj E. Seppik, N. Ruus, A. Siitam, E. Pähn, H. Rikand), tradukistoj kaj poetoj (Hilda Dresen, H. Adamson), aperis libroj. En la tridekaj jaroj la societo "Espero" havis proksimume 350 membrojn. Ekde 1940 estiĝis paŭzo en la agado de la societo kaj E-movado en Estonio ĝenerale.

Kiam en 1956 reaparis pli favoraj cirkonstancoj, la iamaj aktivuloj Hilda Dresen, E. Linnuse, A. Siitam, H. Saha kaj kelkaj aliaj revigligis E-movadon ankaŭ en Tallinn. Oni ekagis komence kiel sekcio de diversaj kluboj, kaj ekde 1970 kiel Tallinna Esperanto-Klubo ĉe "Domo de Tallinnaj Klerig- kaj Scienc-Laboruloj".

La klubo havas en la lastaj jaroj proksimume 70 membrojn. Ĝia ĉefa celo kaj agado estas direktita al pliperfektigo de la lingva nivelo de la membraro, sed laŭeble ankaŭ propagando de la internacia lingvo, kvankam por la lasta ankoraŭ mankas favoraj cirkonstancoj. Ĉiujare la klubo aranĝas novan kurson. J. Palu instruas Esperanton ankaŭ en kelkaj lernejoj. En ĉiujmerkredaj klubvesperoj la sola parolata lingvo estas Esperante. La ĉefa rimedo por paroligi dezirantojn ankaŭ publike estas la programo de la klubvesperoj, t.n. "Viva Gazeto", heredaĵo de la iama "Espero". "Viva Gazeto" redaktas laŭvice ĉiuj estraranoj de la klubo. Oni strebas fari "Vivajn Gazetojn" laŭeble diversflankaj. Ili enhavas informojn kaj novaĵojn el la loka kaj tutmonda E-movado, leterojn de korespondantoj, aktualaĵojn pri scienco kaj tekniko, revuojn pri la tutmonda politiko. Celebrataj estas gravaj jubileoj de elstaraj kulturagantoj naciaj aŭ mondskalaj. Ofte oni rakontas pri siaj turismaj impresoj akompa-

ne de lumbildoj. Ni strebas, ke la programeroj de "Gazeto" ne estu longaj kaj emigaj, sed ilin prezentu laŭeble pli multaj esperantistoj. Per tia organizo de la klubvesperoj la klubo atingis, ke keldeko da esperantistoj havas publikan parolkapablon.

Nia klubo havas sian bibliotekon. Ĝi enhavas proksimume 800 volumojn, inter ili tre malnovaj rarajoj kaj multe da nuntempa literaturo. Sed ni ne povas fanfaroni pri granda uzateco de la biblioteko. La estonoj emas aĉeti kaj legi sian propran libron, ekhavi hejme sian personan bibliotekon. Tio validas ankaŭ rilate esperantistojn. Eble ankaŭ pro tio kreskis en nia klubo ankaŭ da esperantistoj kapablaj por literatura agado (K.Pill, V.Kruusalu, A.Lekko, B. Kärt k.a., se ne paroli ankaŭ pri Hilda Dresen kaj H.Seppik). Ili havas sufiĉajn lingvajn konojn por traduki prozon kaj poezion, redakti esperantlingvajn eldonaĵojn. En la nuna etapo de la movado tio estas unu el la plej aktualaj problemoj jam en kelkaj sovetaj respublikoj. Sen tio nia soveta E-movado ne havus siajn unuajn beletrajn eldonaĵojn nun jam konatajn kaj postulatajn en la vasta mondo.

Kun la Esperanto-Komisiono de la Estona Amikeco-Societo la klubo havas kontentigan kontakton kaj kunlaboron. Ne mankas kontakto ankaŭ kun la respublika packomitato.

La plej granda manko de nia klubo estas, ke ni ne havas aktivajn gejunulojn. Pro seriozeco de la klubvesperoj ilin partoprenas nur malmultaj gejunuloj, kiuj restas pasivaj aŭskultantoj. Kelkfojaj provoj organizi junularan grupon kapablan agi memstare, laŭ siaj propraj interesoj, per siaj propraj fortoj, dum ne donis rezultojn: ankoraŭ mankas tiu junulo aŭ junulino, kiu volus kaj kapablus kuntiri aliajn gejunulojn al aktiva laboro per kaj por Esperanto.

Nia klubo aprezas la junularan Esperanto-movadon en nia lando kaj ĝian gvidadon far SEJM. La klubo estas subtenanto de SEJM kaj strebas kunhelpi, ke ankaŭ la estona E-junularo, kreskinta kaj kreskanta en la nunaj favoraj sovetaj cirkonstancoj, baldaŭ aktive aliĝu al ĝia agado.

J.Ojalo, gvidanto de la klubo.

SUGESTOJ PRI AGADO DUM LA SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO

SIA okazas ĉiunjaron en la lasta plena semajno de februaro. Ĝi celas plifortigi kaj plivigli la kontaktojn inter E-istoj en diversaj landoj. Krome ĝi havas la celon informi pri niaj lingvo kaj movado en ne-E-aj rondo.

1. Unuopaj E-istoj sendu dum la Semajno amikajn salutojn al gekonatej - ne nur al E-istoj, sed ankaŭ al aliaj. Uzu kartojn kun la emblemo de SIA.

2. Lokaj E-grupoj:

- a) aranĝu amikecan feston por la klubo;
- b) sendu salutkartojn al alilandaj kluboj;
- c) atentigu pri la Semajno (ĝia ekzisto) vian lokan ĵurnalon, aliajn societojn, kies membro vi estas;
- ĉ) presigu afiŝojn en nacia lingvo (nepre kun la emblemo);
- d) se la urbo havas ĝemelurbojn en aliaj landoj, aranĝu interŝanĝon de salutoj inter la urbestroj (prefere en E-o), pripensu partoprenon en trajno de amikeco;
- e) aranĝu publikan altnivelan vesperon de amikeco, invitu via-urbajn eminentulojn.

3. Lernejoj, pioniraj rondo:

- a) aranĝu ekspoziciojn, ekz. de infandeseĝnaĵoj;
- b) interŝanĝu salutojn inter via klaso kaj alilanda;
- c) aranĝu ion publikan en la lernejo por festi la Semajnon.

(Laŭ materialoj de Hungara EA)

ĈU VI KONAS HERALDIKON?

Verŝajne ne multaj el vi ion scias pri la scienco, kiu prezentas al ni la historion kaj evoluon de blazenoj kaj flagoj. Dum ĉiuj internaciaj kunvenoj, konferencoj, kongresoj, sportkonkuroj oni povas vidi grandan amason da flagoj, naciaj kaj internaciaj. Per prepara blazeno kaj flago prezentigas ĉiu ŝtato en la mondo.

Por esplori la historion kaj iel reguligi la naskigon de tiel multaj simbolaĵoj ekzistas apartaj sciencbranĉoj: veksilelogio (pri flagoj) kaj heraldiko (pri blazenoj). En nia lando kaj en aliaj oni eldonas specialan literaturon, sed ĝi tuj fariĝas raraĵo kaj libere vi ĝin ne trovos. Ruslingva heraldika vortaro estis eldonita en 1912.

En 1977 ĉeĥoslovaka fakule Jaroslav Klement kompilis la unuan "Veksilelogian kaj heraldikan terminaron" en Esperanto. Oni provas ĝin eldoni eble en 1979. Mi opinias, ke necesus eklaberi ankaŭ per prepari similan vortaron E-rusan. Kelkajn kontaktojn tiucele mi jam starigis. Mi konatigis perletere kun fakuloj pri la temo (el preskaŭ dek urbej), kiuj esprimis deziron kunlaberi; kelkaj el ili eĉ eklernis Esperanton. Krome mi starigis bonajn ligojn kun la Ĉeĥelga klube de veksilelogio kaj heraldiko en Saratov kaj kun simila klubo en Praha. Ekzistas tiaj kluboj aŭ asocioj en multaj aliaj landoj.

Mi velus scii opinionon de aliaj movadanoj pri la iniciato. Krom se vi havas iujn librojn, vortarojn, bildkartojn ktp. pri la temo, bonvolu min pri tio informi. Mi antaŭdankas vin pre via atento.

N.Staredubcev (340092 Deneck, abenkeste 618).

MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO

GRAVA VIZITO

La 17-an de februaro 1978 prezidante de SEJM A.Melnikov kaj sekretario de SEJM P.Jegerovas aŭdiencis de vicprezidanto de Prezidio de SSOD Peslĵak M.M. En la interparolo partoprenis la respondeca sekretario de la Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetaj esperantistoj ĉe SSOD Berjoza A.V. Temis pri aktivigo de la agado de la E-Komisiono, pri ebla kontribuo de soveta E-junularo al la labore de la Komisiono kaj pri ĝeneralaj problemoj de la landa E-movado.

ESPERANTO KAJ MALSTREĈIĜO

- al tiu aktuala temo estas dediĉita granda artikolo de D.Perevalov en "Moskvaj Novaĵoj" N-3 (angla, hispana kaj araba eldonoj). De la sama aŭtore, membre de Moskva junulara E-klubo, aperis informo en N-3 de "Neva tempo" kaj estas atendata en N-2 de "XI jarcento kaj paco".

EKSPozICIO DE INFANDESEGNAĴOJ

dediĉita al Internacia jaro de infanoj, okazos junio, iniciate de Ĉeĥa E-junularo. Temo: "Mia patrujo", partopreni rajtas ĉiuj infanoj ĝis 15 jaroj. Ĉiu kontribuaĵo estas premiita. Sub desegnaĵo estu nomo, aĝo kaj lando, dorsflanke - la adreso. La desegnaĵojn sendu ĝis 1.5. al: Ĉeĥa E-Junularo, Jilska 10, 110 00 Praha 1, CSSR.

PRI LA VORTO "KONFIRMI"

- atentigas R.Grinŝpan (Taŝkento): laŭ ĉiuj sencoj donitaj en PIV ĝi ne estas uzenda en senco "postenigi" (ekz. en Konferencaj Decidoj). ~~La informilo estas uzenda nur enlande!~~ Fintaĵpita 20.2.78. Ĉiujn materialojn por "A" sendu al 121019 Moskvo d/v Areloviĉu V.S.